

trimestriel
1^{er}
trimestre
2004

LA INFORMILO

N° 125

l'espéranto



*la langue de l'amitié
sans frontières*



esperanto



*la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj*

esperanto
France-Est

Editeur :

**ESPERANTO
FRANCE-EST**

Association Culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale
ESPERANTO

regroupant les
départements :

Meurthe-et-Moselle(54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)



Vosges (88)

Maison des Jeunes et de la
Culture « Philippe Desforges »
27, rue de la République
F-54000 NANCY

ABONNEMENT
ABONO
annuel / jara
12 €
eksterlando
16 €



le Centre Mondial de la Paix des Libertés et des Droits de l'Homme ...



26 / 28 mars 2004
fin de semaine culturelle
internationale

VERDUN

**... ouvre ses portes
à l'espéranto**

Rédaction: **Pol DENIS**, 5 Chemin de Blamecourt **55000 BAR-le-DUC**

☎ (+33) 03 29 79 01 44 ✉ pol.denis@wanadoo.fr

port. : 06 98 09 62 81

Tout article à insérer doit parvenir impérativement à la rédaction au minimum un mois
avant la fin de chaque trimestre.

Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.

Comité de l'Association

Président : **Catherine GALLEGO**, 49 rue du Gl De Gaulle **57330 HETTANGE-GRANDE**

☎ (+33) 03 82 53 05 51

Vice-Président : **Gilbert STAMMBACH**, 24 rue Albert Zimmer **67610 LA WANTZENAU**

☎ (+33) 03 88 96 67 59 ✉ gilbert.stammbach@mageos.com

Secrétaire : **Armand HUBERT**, 13 Chemin de la Solitude **57 200 SARREGUEMINES**

☎ / fax (+33) 03 87 95 07 75 ✉ arm.hubert@wanadoo.fr

Secrétaire-Adjoint : **Claudy DEMONGEOT**, 96 rue du Placieux **54000 NANCY *****

☎ (+33) 03 83 40 45 77 ✉ claudy.esperanto@wanadoo.fr

Trésorier : **André GROSSMANN**, 5 rue des Pyrénées **68390 BALDERSHEIM**

☎ (+33) 03 89 45 62 89 ✉ andreo.gr04@free.fr (attention... nouvelle adresse !) ⇄

Trésorier-Adjoint : **Jacques HERLE**, 1 Chemin du Berger **57380 MAINVILLERS**

☎ (+33) 03 87 01 00 39

Cours par correspondance : **Robert KUENY**, 30 rue des Champs **68690 GEISHOUSE**

☎ (+33) 03 89 82 37 62

Service librairie : **Jean-Luc THIBIAS**, 37 rue P. et M. Curie **54500 VANDOEUVRE** (attention...

☎ (+33) 03 83 53 57 54 ✉ esperanto.nancy@wanadoo.fr nouvelle adresse)

Rédacteur de « La INFORMILO » : **Pol DENIS** (voir ci-dessus)

*** nouvelle adresse: **Claudy DEMONGEOT** : Centre Hospitalier de Montfayet, bungalow 71,
2, av. de la Pinède **84140 MONTFAYET**

Assesseurs : **Roger DEGRELLE** ☎ (+33) 03 82 21 92

Edmond LUDWIG ☎ / fax (+33) 03 89 77 52 56 ✉ take.ladomo@wanadoo.com

Ginette MARTIN ☎ (+33) 03 29 24 68 46 ✉ gimavo@wanadoo.fr

Abonnement à “La INFORMILO” (tarif en première page)

... chèque bancaire ou postal au nom de ESPERANTO FRANCE-EST **CCP : 1997 72 W - NANCY**

... adressé au trésorier (voir adresse ci-dessus)

Abono al “La INFORMILO” (vidu la unuan paĝon)

... banko- au poŝt-ĉeko (en €) CCP 1997 72 W – NANCY, je la nomo de ESPERANTO FRANCE-EST

sendita al la kasisto

Changement d'adresse (adres-ŝanĝiĝo) informer le trésorier (informu la kasiston **A. GROSSMANN**)

Sommaire

- 1 – 5 infos presse
- 6 – 7 Europe Espéranto
- 8 symposium à Vienne
- 9 logiciel skype
- 10 espéranto et télévision
- 11 actions locales
- 12 eùropa bunto
- 13 – 16 rapports voyages
- 17 – 18 libro-servo
- 19 – 20 bulletins d'adhésion
- 21 – 22 argumentaire
- 23 – 24 kaléidoscope
- 25 – 27 vinil-kosmo
- 28 Mazi
- 29 smiley
- 30 page du trésorier
- 31 – 33 pages détente

ISSN 0291 6037 trimestriel

Bulletin d'information bilingue sur l'espéranto
édité par l'association culturelle **Espéranto-France Est**
MJC Philippe Desforges - 27 rue de la République
54000 NANCY

Directeur de la publication : **Catherine GALLEGO**

Rédacteur : **Pol DENIS**

Dépôt légal : 31 mars 2004

Imprimé par l'Office Central de Coopération à l'Ecole

1, rue Fr. de Guise 55000 BAR-le-DUC

N° CPPAP : **62887**

===== **Une missive du président de l'association Espéranto-France** =====
aux parlementaires européens, membres de la Commission constituante
d'une constitution européenne

Objet : Réunion du mardi 16 mars 2004. Rapport "2003/2227 REG" concernant des procédures provisoires au cas où le système de traduction et d'interprétation ne garantirait pas une stricte égalité entre les langues dès le premier jour de l'élargissement.

Monsieur le Député, Madame le Député,

Vous avez la mission difficile, dans le cadre du démocratique multilinguisme institutionnel, dans l'objectif de préserver et faire respecter la diversité linguistique et culturelle de l'Europe, de promouvoir des solutions de traduction et d'interprétation garantissant l'égalité entre les langues. Ces solutions devront bien entendu également garantir toute la précision, toutes les nuances, toute l'objectivité des traductions, ainsi bien sûr que le moindre coût !

Il paraît objectivement certain que le passage par une ou deux langues-relais est une solution (d'ailleurs déjà mise en application) à envisager pour des raisons techniques et financières évidentes. A notre association **Espéranto-France**, nous pensons alors que l'outil "espéranto" - comme langue-relais - ne doit en aucun cas être rejeté, mais qu'il doit au contraire être examiné en toute objectivité.

Nous appuyons à ce sujet les remarques de Monsieur Gianfranco Dell'Alba qui, sans proposer directement l'espéranto, prend en considération la valeur d'objectivité et de neutralité d'une telle langue comme langue-relais de traduction et d'interprétation, en comparaison d'une langue nationale telle que l'anglais. Nous vous serions obligés de bien vouloir prendre en considération ces remarques dans votre prise de décision.

Nous nous permettons par ailleurs de ne pas être d'accord avec les arguments de Messieurs Michael Gahler et Ingo Friedrich qui reprochent à l'espéranto son "manque de culture". Il est en effet incontestable au contraire que l'espéranto est riche d'une florissante tradition littéraire d'oeuvres originales et traduites, reconnue en particulier par le **PEN-Club international** qui a accueilli une section espéranto depuis 1993. Il est incontestable que cette culture appartient à tous les peuples. Il est possible de s'en rendre compte au cours des congrès mondiaux annuels d'espéranto au cours desquels sont débattus, sans interprètes, des sujets concernant tous les aspects de l'activité humaine. Il est incontestable que cette culture a été reconnue par l'**Unesco** en 1954, et que cette reconnaissance était complétée en 1985 quand la Conférence générale de l'Unesco appelait ses états-membres et les organisations internationales à promouvoir l'enseignement de l'espéranto dans les écoles et son emploi dans les affaires internationales.

Il est incontestable bien sûr que cette langue espéranto, qui appartient à tous les hommes et à tous les peuples, ne peut pour cette raison que contribuer à maintenir la diversité culturelle dont elle est faite elle-même et à préserver cette richesse de l'Europe. Le choix d'une langue nationale telle que l'anglais ne peut au contraire qu'accélérer la disparition de cette diversité au profit d'une culture spécifique nationale orientée, avec ses retombées inévitables sur l'économie, la politique, etc...

A notre association Espéranto-France -comme à notre association mondiale UEA- nous considérons que ce maintien d'une diversité linguistique et culturelle est notre objectif de base en face des risques d'hégémonie et de discrimination en faveur de l'anglo-américain. En particulier, nous stigmatisons officiellement par tous les moyens, auprès de la Commission, la discrimination linguistique de certaines offres d'emploi explicitement réservées à des "English native speakers".

Je me permets de vous rappeler la lettre que je vous ai adressée, ainsi qu'à vos collègues parlementaires en octobre 2003, et la "*Déclaration de l'association Espéranto-France sur la sauvegarde de la diversité linguistique en Europe*" de juin 2003 qui y était jointe. Il y est proposé une expérimentation, dûment contrôlée et mesurée de l'espéranto comme langue-relais de traduction et d'interprétation dans le fonctionnement des instances européennes.

Je vous serais très reconnaissant de prendre en considération ces propositions, qui sont très pragmatiques et représentent un minimum de coût, comme base d'une solution absolument neutre et objective au problème difficile qui vous est posé.

Je vous prie d'agréer l'assurance de mes sentiments très respectueux.

Claude Longue-Épée

L'espéranto est une langue vivante ! ===== ☆

Telle est la conclusion de l'Institut de Linguistique de l'Académie hongroise des Sciences "Après une bataille de plusieurs années, les espérantophones hongrois ont réussi à faire reconnaître l'espéranto comme une langue vivante" vient de déclarer Oszkar Princz, secrétaire général de l'Association Hongroise d'Espéranto.

Le Ministre hongrois de l'Education vient en effet d'informer l'Association Hongroise d'Espéranto que, selon une déclaration de l'Institut de Linguistique de l'Académie hongroise des Sciences, l'espéranto peut désormais être qualifié de "langue vivante". Récemment quelques instituts d'enseignement de l'Etat n'avaient pas voulu le considérer comme une langue à part entière, au même titre les autres, ce qui avait quelque peu freiné son enseignement. Depuis l'année 1995 l'on constate un phénomène intéressant en Hongrie. Une nouvelle loi rend obligatoire, pour les étudiants des universités et instituts supérieurs, la réussite à un examen de langue étrangère.

Depuis cette date, le nombre des étudiants qui choisissent l'espéranto s'est brusquement accru, explique O. Princz, à un point tel que, en 2002, l'espéranto est arrivé en troisième position, derrière l'anglais et l'allemand, mais devant le français. Un tel résultat permet désormais de proposer un cours d'espéranto à tous les niveaux de l'enseignement.

De leur côté des universitaires espérantophones qui président aux activités d'une Académie internationale des sciences basée à Saint-Marin, ont collaboré avec l'université roumaine Lucian Blaga, de Sibiu, pour la création d'une unité où l'espéranto sera la langue de travail principale, et pour la naissance d'une université libre européenne à Komarno, cité slovaquo-hongroise, où l'Académie a également organisé une session, comme à Karlovo en Bulgarie.

L'université de Poznan en Pologne, délivre un diplôme spécifique consacrant trois années d'études dédiées à l'interlinguistique et à l'espéranto, de même que celle de Eötvös-Lorand de Budapest, qui attribue un diplôme officiel couronnant un cycle de quatre années de thème à sujets identiques à ceux de Poznan. L'espéranto arrive en troisième position parmi les langues obligatoirement choisies par les étudiants pour l'obtention du diplôme nécessaire à la poursuite de leurs études.

L'espéranto de plus en plus présent sur internet ===== ☆

La langue internationale a trouvé un nouveau terrain favorable d'expansion grâce à internet où les sites concernés sont de plus en plus visités.

Le site www.esperanto.net, proposé en premier par les moteurs de recherche, donne, en 57 langues, les informations utiles et les liens nécessaires aux internautes désirant une bonne documentation de base.

Les internautes de la région Nord-Est profitent du site spécifique <http://mulhouse.esperanto.free.fr> particulièrement fourni. Comptes-rendus de rencontres et d'activités avec photothèque exhaustive, calendrier régulièrement mis à jour et liens particulièrement utiles. Sont répertoriées les relations transfrontalières avec les clubs voisins de Bade-Wurtemberg et de Suisse.

Les cours d'apprentissage de la langue sont très sollicités et des correcteurs supplémentaires sont constamment recherchés.

Après cette étude, éventuellement renforcée au sein des milliers de groupes locaux d'espérantophones actifs dans plus de cent pays, les intéressés ont à leur disposition un nombre de plus en plus important de sites les informant des activités des associations et des forums de discussion, outre de plaisir de pouvoir échanger avec des amis du bout du monde sans barrières linguistiques.

Le site de la Fédération suédoise d'espéranto accueillait récemment son **cinq millionième visiteur** !

L'espéranto en Extrême-Orient ===== ☆

Alors que l'anglo-américain tend à s'imposer comme langue dominante dans les relations internationales, il est peut-être significatif que c'est en Chine, à Pékin, du 24 au 31 juillet 2004, que se tiendra le congrès annuel mondial d'espéranto, avec justement pour thème : « L'égalité linguistique dans les relations internationales ».

Une douzaine d'universités chinoises proposent aux étudiants des cours d'espéranto qui procurent aux participants, des points supplémentaires pour leur cursus universitaire.

En Corée du sud, l'espéranto est aussi officiellement sujet d'étude dans les universités de Séoul, Chonan et Wonkwang.

Au Japon, où l'on prévoit l'organisation du congrès mondial de l'UEA pour 2007 à Yokohama, le congrès national de 2003 a réuni des centaines de participants à Kameoka, près de Kyoto.

A la séance inaugurale, M. Reinhard Selten, prix Nobel d'Economie et lui-même espérantophone, a prononcé une conférence.

“ HADES ”, une revue étudiante unique ————— ☆

Avec le soutien de l'Union Européenne, dans le cadre du Programme Européen Jeunesse, avec l'appui de l'Ecole des Mines de PARIS, de la FIMMM (Fondation des Industries Minérales, Minières et Métallurgiques) et en collaboration avec Espéranto-Jeunes, cette revue d'actualité bilingue français-espéranto, vient de voir le jour en décembre dernier.

Ce magazine de présentation luxueuse et attractive, offre au lecteur un panorama diversifié, centré autour de la vie active de l'étudiant avec un regard nouveau porté au-delà des frontières. Au sommaire du n°1, un reportage sur Budapest, une étude originale sur le café... “ petit métronome noir pour l'étudiant ”... , la découverte de l'expo Reiser à Beaubourg, une enquête sur le “soulèvement” des livres et bien sûr un dossier original sur la fête de Noël dans le monde.

Les espérantophones ne manqueront pas de parrainer une revue jeune et moderne qui ambitionne de promouvoir la langue internationale au sein mais également à l'extérieur du milieu étudiant :

<http://hades-presse.com>

L'Australie et l'espéranto ————— ☆

On se souvient que l'un de ses ambassadeurs, **Ralph Harry**, qui avait commis en son temps un ouvrage intitulé “*The Diplomat who Laughed*” (*Le diplomate qui riait*), était un espérantophone convaincu... Il avait d'ailleurs traduit son livre en espéranto (*La Diplomato, kiu Ridis*).

L'Australie persiste dans sa sympathie affichée pour la langue internationale. On peut consulter en particulier un site plurilingue sur le *Jardin Botanique de Canberra*, où l'espéranto voisine... avec le chinois ! Une promenade alléchante avec photos à l'appui, qui ne peut qu'inciter le touriste à s'envoler pour les antipodes :

www.anbg.gov.au/anbg/esperanto/index.html L'espérantophone peut bien entendu se

mettre à l'écoute de **3ZZZ**, qui diffuse des programmes appropriés... Celui du 8 mars -près d'une heure- était dédié... à la *journée de la femme*. Ecoute sans problème avec “*Real Player*”... Se rendre sur le site <http://www.3zzz.com.au> ... et choisir l'espéranto parmi la liste impressionnante des langues de diffusion de la radio australienne.



Le “KoToPo”, un espace multiculturel lyonnais ————— ☆


Situé au 14 de la rue René Leynaud, dans le quartier de la Croix-Rousse, le KoToPo est un lieu de rencontre original, créé sous les auspices de l'association “Mille et une Langues”, à l'instigation d'un groupe de jeunes espérantophones audacieux qui définissaient ainsi leur ambition de départ ...

“ ...Ecouter une conférence, participer un débat, assister à un spectacle, visiter une exposition ou simplement s'asseoir au coin bar et discuter entre amis... les possibilités qu'offre le KoToPo sont diverses mais ont toutes un point commun : l'ouverture à d'autres cultures. C'est pourquoi le KoToPo a depuis le départ décidé de collaborer avec de nombreuses associations culturelles.

Cours, historiques, événements culturels, aspects sociaux ou linguistiques, on peut trouver au KoToPo des informations sur les langues les plus diverses, du quéchua au russe en passant par l'espéranto.

Pour qui fréquente le lieu, entendre autour de soi parler quatre ou cinq langues lors de la même soirée n'est pas chose rare. L'équipe d'animation, elle-même bien souvent internationale, participe à créer cette ambiance multiculturelle....

Un centre d'informations sur l'espéranto est bien entendu à la disposition des visiteurs Pour en savoir davantage : www.kotopo.net



“ Chers amis de l'espéranto,



Même si cela, a pu paraître incroyable à beaucoup d'entre nous il y a 6 mois, aujourd'hui c'est un fait historique majeur et incontournable pour le mouvement pour l'Espéranto et pour la politique européenne en générale...

Le mouvement "**Europe Démocratie Esperanto**" est devenu une réalité tangible dans la perspective de la campagne électorale européenne de 2004. Il s'agit de la seule formation, de dimension européenne, qui plus est, qui inscrit l'Espéranto dans un programme clairement centré sur le souci d'établir un fonctionnement réellement démocratique de l'Union européenne.

Chaque jour cette orientation politique apparaît comme sage et d'actualité devant les déclarations de plus en plus inquiétantes émanant des dirigeants les plus en vue de la commission européenne et qui annoncent de façon quasiment agressive, **qu'il est hors de question pour eux, que soit discutée la suprématie de l'anglais** et par voie de conséquence de ses locuteurs privilégiés dans les débats de la commission, voire des commissions parlementaires, voire du parlement lui même. Aucune autre formation politique ne s'insurge contre ces dictats inqualifiables, et encore moins ne propose d'alternative crédible à ce naufrage annoncé.

Les choses sont claires et chacun doit prendre la mesure de sa responsabilité individuelle de citoyen dans ce qu'il faut hélas considérer comme un combat, alors que la démarche des membres du mouvement pour l'espéranto s'est toujours appuyée sur la confiance dans la force de démonstration, de la raison, de la justice. Aujourd'hui les masques sont tombés, le choc que nous ressentons gagne de très nombreux citoyens qui voudront exprimer leur refus de cette évolution hégémonique désastreuse, hypothéquant tout autre débat, ou évolution des autres champs de compétence de l'Union Européenne.

Heureusement nous pourrons exprimer la volonté d'un virage à 180 °, d'un contre pied irréfutable à la politique linguistique et culturelle d'ors et déjà annoncée au mépris de tout débat démocratique par les Messieurs Prodi, consort et autres Dames.

Heureusement nous disposons maintenant du mouvement "**Eùropo Demokratio Esperanto**" dont l'évolution, l'étendue, et l'audience surprennent tout le monde, même ses premiers protagonistes ! Il nous reste -il vous reste !- à mesurer l'ampleur historique de ce phénomène et à choisir je l'espère de **le soutenir massivement**.

Le site <http://e-d-e.org> mérite votre attention... Que les plus téméraires s'engagent dans la campagne, que les autres amis de l'espéranto divulguent l'information, et alors il faudra bien que les autoproclamées élites des institutions européennes s'inclinent devant la raison, la générosité et la démocratie !

Merci de votre attention, l'avenir de ce qui vous tient à coeur est évidemment dans vos mains ! “

Denis-Serge CLOPEAU

secrétaire de la fédération **Eùropo Demokratio Esperanto**.



**... l'Europe
pour s'entendre ...**



**... l'Espéranto
pour se comprendre ! ...**

« Dans l'Europe élargie de l'an 2004, l'heure enfin sonner »

de l'Espéranto, cet outil formidable et méconnu, va
G. Kersaudy, *La Informilo*, n° 124.

ELECTIONS EUROPÉENNES DU 13 JUIN 2004

LISTES E-D-E

(**EUROPE - DÉMOCRATIE - ESPÉRANTO**)

Pour une réelle démocratie européenne :

- Une Europe indépendante, à l'abri de l'hégémonie américaine,
- Une Europe des citoyens, qui protège activement ses langues et ses cultures,
- Une Europe où tous les citoyens pourront se parler, et donc mieux se comprendre, grâce à l'espéranto, langue neutre, d'accès rapide, avec laquelle tous les européens seront linguistiquement égaux,
- Une Europe efficace, qui ne soit plus freinée par l'usage inconsideré de l'anglais, langue inégalitaire, handicap majeur pour notre conscience européenne et notre développement.

Dans chacune des 7 circonscriptions de la France métropolitaine, mais aussi très probablement en Allemagne, l'Espéranto, avec E-D-E, sera présent ! Dans la circonscription Ile-de-France, la liste sera emmenée par G. Kersaudy. En Allemagne, **le Prix Nobel d'Économie 1994, R. Selten** a accepté de conduire la liste E-D-E !!

La circonscription Est comprend les 5 régions ALSACE, BOURGOGNE, CHAMPAGNE-ARDENNE, FRANCHE-COMTÉ et LORRAINE. Comme 10 députés européens seront élus dans cette circonscription, la liste devra compter 20 noms, alternant homme-femme ou femme-homme.

Pour le moment, nous sommes déjà 16 candidats déclarés : Bruno **Schmitt** (professeur des universités en retraite, Alsace, tête de liste), Claire **Lauffenburger** (médecin, Alsace), Christophe **Lavarenne** (ingénieur, Bourgogne), Jacqueline **Poux** (intitutrice, Franche-Comté), Cyrille **Hurstel** (ingénieur, Alsace), Joëlle **Cunnac** (secrétaire de direction, Bourgogne), Jean-Christophe **Vincent** (ingénieur, Alsace), Aurélia **Goulmy** (chercheuse d'emploi, Alsace), Alain **Lauffenburger** (professeur de langues, Alsace), Catherine **Roux** (secrétaire, Lorraine), Bruno **Henry** (agent SNCF, Lorraine), Catherine **Gallego** (guide interprète, Lorraine), Thomas **Cordonnier** (programmeur en informatique, Lorraine), Michèle **Guigouin** (Champagne-Ardenne), Roland **Cuénot** (Chef de Service Éducatif, Franche-Comté), Anna-Maria **Trésorier-Bors** (Franche-Comté).

Appel à participation : Pour que les électeurs puissent voter pour nous, ils devront avoir en main un bulletin de vote. Nous allons mettre en ligne, sur notre site, pour chacune des circonscriptions, un bulletin de vote que vous pourrez télécharger, puis imprimer chez vous et découper, pour vous et pour tout votre entourage familial, professionnel, etc ... Ainsi les économies de papier et de frais pourront être significatives !!

Mais cela est insuffisant : nous allons aussi imprimer et distribuer, dans la mesure de nos moyens, les documents officiels (professions de foi et bulletins de vote), envoyés chez les électeurs par les municipalités. Nous avons calculé que 10 € permettaient d'équiper ainsi environ 1000 électeurs (mais sans compter les frais de distribution de ces documents dans les différents arrondissements). Et il y a entre 6 et 8 millions d'électeurs dans notre circonscription !!

Si vous voulez participer financièrement à notre entreprise, envoyez à :

Association EDE-Est, Bambois, 68650 LAPOUTROIE...

un chèque de 10 € pour devenir membre, **un chèque de 20 € ou plus** pour être membre bienfaiteur. Cette somme sera intégralement affectée à l'édition et au transport des documents de vote officiels. Nous vous enverrons alors votre carte de membre de l'association EDE-Est, et un **reçu officiel, que vous pourrez joindre à votre déclaration d'impôts** (en février 2005), et qui vous permettra de bénéficier d'une **réduction de 60% du montant de votre chèque**, sur vos impôts sur le revenu de 2004, à condition que votre participation n'excède pas 20% de votre revenu imposable de l'année.

Merci pour votre participation !!

Merci à vous de diffuser à tous vos amis et connaissances cet appel, que vous pouvez trouver sur notre site :

<http://est.edefrance.org>

=====

apprendre l'espéranto...	<i>rapidité...</i>	☆ un matériel adapté
	<i>efficacité...</i>	☆ une technique éprouvée
...chez soi !	<i>deux maîtres-mots de notre cours par correspondance !...</i>	☆ un réseau d'animateurs compétents
Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE		☆ un savoir immédiatement opérationnel
		<i>une diffusion sur toute la région ...et au-delà !</i>

===== ☎ 03 89 82 37 62 =====

"EŬROPA BULTENO" REVIVIĜAS



Internacia sendependa revuo "La Ondo de Esperanto", eldonata en Kaliningrado (Ruslando), ekde sia marta numero enhavas specialan kvarpaĝan aldonon kun la titolo "Eŭropa Bulteno". Per tio reviviĝas la "Eŭropa Bulteno", kiu ĉesis aperi en 2002 post la ekŝiĝo de Umberto Broccatelli kiel prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio.

"Esperi pri daŭrado de harmonio inter multaj ŝtatoj sendependaj kaj malligitaj, tio estus neglekti la unuforman iradon de la homaj okazaĵoj kaj kontraŭiri la sperton akumulitan de la tempo". Tia estis la profeta malfermo de ĉiu numero de "Eŭropa Bulteno" ekde decembro 1999, citita laŭ la vortoj de usona ŝtatisto Alexander Hamilton.

Broccatelli redaktis 21 Esperanta.

numerojn, kaj en la lasta numero deklaris, ke li restas fidela al siaj idealoj Eŭropa kaj

Nova generacio, interalie *Seán Ó Riain* kaj *Dafydd ap Fergus*, transprenis en 2002 la gvidadon de EEU kaj de la nove kreita Brusela Komunikadcentro. La energio de BKC komence tute direktiĝis al kreado de interreta komunika sistemo kaj konstruado de alirejoj al politikistoj kaj varbado de kunlaborantoj. Nun venis la tempo por redoni atenton al la komunikado kun malretemaj esperantistoj.

En aprilo 2003 aperis provnumero de nova "Eŭropa Bulteno". Post traktado kun la eldonejo "Sezonoj", estis trovita solvo por certigi profesie aranĝitan raportetaron pri la Eŭropa Unio.

Dafydd ap Fergus redaktos ĉiumonate kvar paĝojn en la -- cetere tre interesa -- senpartieca magazino "*La Ondo de Esperanto*". En la marta eldono aperis: "*Bilbao bonvenigas Esperanton*", debato pri Esperanto en la Franca Asembleo, kvin novaĵoj pri Esperanto kaj Eŭropa Unio, "*Kiu inventis la eŭron*" kaj raporto pri la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo. La aprila numero aperos la 20an de marto.

Oni povas aboni al "La Ondo de Esperanto" (samtempe, kaj sen plia pago, al "Eŭropa Bulteno") kontraŭ 25 eŭroj jare (15 eŭroj por orienteŭropanoj) ĉe UEA kaj pluraj landaj perantoj. Petu pliajn informojn rete ĉe: sezonoj@gazinter.net

Informas EEU kaj "La Ondo de Esperanto"

La Ondo de Esperanto / Sezonoj / Balta Esperanto-Forumo

Halina Gorecka / Aleksander Korzhenkov

Adreso: RU-236039 Kaliningrad, p. k. 1248, Ruslando

Retadreso: sezonoj@gazinter.net Eo: <http://Esperanto.Org/Ondo> Ru: <http://users.gazinter.net/sezonoj/>

Telefono: (0112) 566033



Grava simpozio en VIENO

En tiu ĉi jaro, **Internacia Esperanto-Muzeo** (IEM) festas jubileon: Antaŭ 75 jaroj ĝi fariĝis parto de la **Aŭstria Nacia Biblioteko**. Estas unika fakto, ke Nacia Biblioteko oficiale vivtenas Esperanto-muzeon kaj Esperanto-bibliotekon. Pro tiu subteno IEM fariĝis la plej granda plene funkcia biblioteko por Esperanto kaj Interlingvistiko, tute je la servo de esperantistoj kaj lingvistoj. Ĝia elektronika katalogo (TROVANTO) estas alirebla pere de nia hejmapaĝo:

<http://www.onb.ac.at/sammlungen/planspraechen/eo/index.htm>

Okaze de tiu jubileo, Aŭstria Nacia Biblioteko organizos simpozion.


La 8-an kaj 9-an de oktobro 2004, la **Aŭstria Nacia Biblioteko**, en kunlaboro kun **Universala Esperanto-Asocio** organizos simpozion okaze de du Esperanto-jubileoj: la centa datreveno de la naskiĝo de *Lidia Zamenhof* (1904 - 1942), kaj la 75-jariĝo de la **Internacia Esperanto-Muzeo** (IEM, aligita al la Aŭstria Nacia Biblioteko en 1929).

Prelegos *Ulrich Lins* (Germanio/Japanio, ĉefpreleganto), *Vilmos Benczik* (Hungario), *Wera* kaj *Detlev Blanke* (Germanio), *Heiner Eichner* (Universitato de Vieno, Aŭstrio), *Alex Káfer* (Aŭstrio), *Herbert Mayer* (IEM, Aŭstrio), *Claude Piron* (Svisio).

La historio de Esperanto kaj la sorto de ĝenerala historia evoluo. Verki historion historio de la mondo. Tion montris *Ulrich persekutoj kontraŭ Esperanto*". Esperanto foje opinias la ĝenerala publiko, sed ĝi

Tiu fakto estas la elirpunkto de la Esperanto en la politikaj-ideologiaj interalie la atenton al la sorto de *Lidia Zamenhof* (murdita en la koncentrejo *Treblinka* en 1942) kaj de la Internacia Esperanto-Muzeo (fermita en 1938 fare de la nazioj). Apud tio pritraktiĝos ankaŭ temoj, kiuj tuŝas la nuntempon: Kia estas hodiaŭ la situacio de Esperanto en la mondo? Kiel aspektas la rilato inter Esperanto kaj la nunaj politikaj regantoj? Kiel konduki la esperantistoj en mondo, kiu almenaŭ en la publika diskurso ege malfavoras la ideon de artefarita internacia helplingvo, sed aliflanke pere de modernaj teknologioj ofertas novajn eblecojn? Laborlingvo dum la unua duontago de la simpozio estos la germana por la ne-Esperanta publiko - la cetero disvolviĝos en Esperanto.

Paralele okazos: malfermo de ekspozicio pri la sama temo en la **Internacia Esperanto-Muzeo**, prezento de la **noveldonita plena verkaro de Lidia Zamenhof**, kaj **internacia Cseh-kurso por tutkomencantoj**. (La germana nomo de la aranĝo estas: *Die gefährliche Sprache*)



esperantistoj estas firme ligita al la de Esperanto signifas verki kadre de la Lins per "*La danĝera lingvo. Studo pri la do ne estas io ekzotika kaj margena, kiel estas integra parto de historiaj evoluoj.*

simpozio, kiu pritraktas la destinon de uraganoj de la pasinta jarcento, fokusante

Sammlung für Plansprachen und Internationales Esperanto-Museum der Österreichischen Nationalbibliothek
Hofburg, Michaelerkuppel, AT-1010 WIEN Tel. : 0043/1/ 535 5145

Internacia Esperanto-Muzeo Hofburg, Michaelerkuppel, AT-1010 VIENNO

Homepage und Plansprachendatenbank TROVANTO:

Hejmpaĝo kun la elektronika katalogo TROVANTO:

<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm>



Ĉu vi scias, ke vi povas nun komuniki parole kun viaj amikoj en tuta Esperantio, ĉiam ajn kiam vi volas, kaj tute senpage? . . .

Se vi estas esperantisto, havas en la mondo, sufiĉas elŭti kaj instaligi Ĝi ebligas uzi vian PC-on kiel ĝi. La softvaro troviĝas ĉe: www.skype.com. Brazilo: <http://www.esperantointernacia.com> jam uzas ĝin kaj ĝi funkcias mirinde bone. kvalito de voĉo sonas eĉ pli bonkvalita



havi strangan impreson de proksimeco, eĉ parolante kun iu sur alia kontinento. La softvaro estas senpage, tute laŭleĝa, funkcias eĉ per modemoj (56K), tute ne ĝenatas de la kontraŭfajrigiloj, kaj entenas nek reklamon nek spjonvaron. Sola malavantaĝo estas ke momente, ĝi funkcias nur per Vindozo (minimume 98), sed nur momente. . .

Memoru kia enorma progreso estis la Interreto por la Esperanto-movado: antaŭ la Interreto, plejparto el ni povis konkrete praktiki Esperanton nur dum ferioj, do nur dum kelkaj semajnoj jare. Kaj de kelkaj jaroj, dank'al la Interreto, ni povas komuniki ĉiutage en Esperanto. Ĝis nun, temis nur pri skriba komunikado, ĉar internacia telefono tro multekostis, kaj ne vere estis agrablaj interretaj paroliloj. La interreton alportis tamen tiun grandan progreson de ĉiutaga komunikebleco. Sed nun alvenas nova epoko, ekde kiam denove dank'al la Interreto, ni finfine povos uzi nian lingvon ĉiutage, ankaŭ parole! *Skajp'* funkcias, kaj facile proveblas. Kompreneble, bezonatas mikrofono, kio ĝenerale facile troveblas en komputilaj butikoj. Ankaŭ, plejparto de ttt-kameraoj nun havas internan mikrofonon.

Se vi ankoraŭ ne konas amikojn de vi, kiuj ĝin uzas, vi tute rajtas provi alvokante min, ekzemple al mia profesia adreso "linguaforce" inter 9H kaj 19H GMT.


Aliteme, ĉar profesie mi laboras en kampo de tradukado, mi havis ideon uzi tiun novan ilon, kiu bone funkcias, kun alian pli malnovan ilon, sed kiu ankoraŭ mirinde bone funkcias: Esperanton. Mia celo estas provi starigi servon de telefona interpretado (voĉa tradukado) inter pluraj landoj. Tiam servon uzas homoj en entreprenoj, kiam ili volas komuniki ekzemple kun kliento eksterlande. Intepretisto tradukas siajn parolojn al la alia homo kaj inversen. Tion teorie eblas fari kun Esperanto kiel pontolingvo, des pli ke jam ekzistas kelkaj tradukkompanioj, kiuj jam faras tion per la angla lingvo, kvankam ĝi estas esence multe pli fuŝa kaj malklara ol Esperanto. :-)

Se interesas vin, aŭ si vi konas esperantiston kiun tio povas interesi, skajpu min por havi pliajn klarigojn.

Ni serĉas interesatojn en ĉiuj landoj de la mondo (kaj ĉefe en Eŭropa Unio, Nordameriko kaj Azio, kie estas nune la plej eventualaj konkretaj bezonoj) por fari provojn.

Philippe Bérizzi (skajpu min ĉe konton "linguaforce")

Philippe Bérizzi (hejme). Telefonu al ni senpage kaj altkvalite per la reto, ĉie tra la mondo, eĉ per simpla modemo:iru ĉe www.skype.com nia konto "berizzi".



"... Ĉar kelkaj ne povis atingi tiujn plej riĉajn paĝojn por aŭskulti radioelsendojn ĝis nun ne facile kapteblajn, mi resendas al vi la retadreson aperintan en "NUN" :

<http://radioarkivo.org>

Ĝi ebligas aŭskultadon de **mondaj stacioj**, kiuj ĝis nun estis malfacile atingeblaj. Post elekto de la koncerna radiostacio, alklaku la daton de la dezirita programo, kaj estu iom pacienca, ĉar via komputilo devas ŝargi la tutan registritan elsendon kaj tio postulas iom da tempo.

Tiam vi povos aŭskulti radioprogramojn ĝis nun malfacile troveblajn. Tute facile vi povas aŭskulti programojn de *Radio Varsovio, Radio Pekino, Radio Havano, Radio Brazilo, Radio Vatikano* kaj aliaj... Radio Pekinon ekzemple de kelkaj monatoj mi ne plu povis aŭdi rekte (pere de *Real Player*) dum paradokse mi ĉiam bone ricevas la pekinajn elsendojn en franca, germana, hispana aŭ angla lingvoj. Same okazis al pluraj el ni... Nun mi povas



denove aŭskulti ĝin registritan de tiu servo. Tute aprezinda en tiu jaro de la UK de Pekino !

Bonan aŭskultadon, kaj pardonon se vi jam uzis tiun servon, kaj se mi ĝenas vin.

Ne forgesu sendi mesaĝon al tiuj stacioj kiuj ĉiam bezonas nian helpon por plu ekzisti.

Bonan "jaron de la simio"

al ĉiuj, aldone je miaj antaŭaj bondeziroj. . .



Amike via,

Maurice SUJET

Cu baldaŭ televido en Esperanto ?



Ĉefredaktoro de la reta informportalo *Ĝangalo* *** kaj inicianto de la projekto *ITV -Internacia TeleVido-*, Flavio Rebelo prelegis en diversaj urboj, interalie en la pariza sidejo de *Esperanto-France* (UFE) dum iu merkreda konversaci-rondo.



"*Mi ne venas paroli al vi pri vendaĵoj, pri komerco aŭ pri projekto... Mi venas paroli al vi pri revo !...*" Jen kiel li komencis sian prelegon. Tamen, post kelkaj minutoj, tiu revo aperas realigebla kaj subteninda.

Kiom da fojoj, ni esperantistoj, aŭdis: "*Estus bone, se ni havus televidon por montri tion aŭ tion al la mondo ! Oni taksus nin pli bone...*" Laŭ Flavio Rebelo, tiu revo iĝos realo... Sed pri kio temas ?

La ideo estas krei post malpli unu jaro retan televidon, uzante la novajn eblecojn de la reto, precipe la elsendfluon, anglalingve *streaming*, kies ĉefa eco estas... la kvalito ! Ĉar tiu televido, videbla de ĉiuj, aperos kiel elmontrilo de Esperanto kaj ties kulturo kaj movado.

La celo estas unuatempe elsendi 4-horan programon ripetatan 6 fojojn tage, tiel ĉiuj mondĉivitanoj povos spekti ĝin. Post kelkaj jaroj estas celite 4-foje 6-horan programon, poste 3-foje 8-horan...

La enhavo estos tiu de iu ajn alia televido : televid-ĵurnalo, intervjuoj, dokumentarioj, kinaĵoj, porinfanaj mov-desegnaĵoj, kursoj... La ĵurnalojn nutros *Ĝangalo* mem, tra ties tutmonda korespond-servo kaj ties ok redaktejoj. La filmoj, krom tiuj jam ekzistantaj en Esperanto, venos el UNESKO, el UNO..., kiuj pretas preskaŭ donaci filmojn aŭ mov-desegnaĵojn, kiujn sufiĉos subtitoligi aŭ dubli.

Por krei ĝin, Flavio bezonas monon, t.e. 35 000 €, por ke la projekto ekestu. Pro tio li nun traveturas Eŭropon. Tuj kiam la "trezoro" atingos 12 000 €, la unua dungo estos tiu de profesiulo, kiu serĉos entreprenojn celantajn pagi publikaĵojn en tutmonda montro-fenestro... Ne temas pri mondonaco, sed pri prunto, pri kvazaŭ akcioj. Al la helpemaj esperantistoj li proponas du garantiojn: -se la kreo de la projekto ne eblos antaŭ julio 2005, li repagos ĉion al tiuj, kiuj pruntedonis pli ol 25 € -se la projekto sukcesos, li proponas aŭ pagi profitparton, aŭ transformi la monon al rabataj akcioj (io kiel *stock options*).

Se la pruntedonanto ne posedas interreton, li povas doni adreson kaj telefonnumeron, por ke ITV havu la eblecon sendi raporton. Esperanto-France (UFE) ankaŭ pretas esti peranto por ĝiri la sumojn en la kontojn GXAN-V de *Ĝangalo*.

Ĉu aĉeti eron de estonta televido estas freneza aŭ reva agado ? "*Ne pli ol aĉeti la libreton Lingvo Internacia antaŭ 117 jaroj...*" Flavio respondas.

Fakte la intereso estas, ke ĝi enigis Esperanton en ĉies internacian nunan informilon. Plie, ĝi ne estas projekto de Brazilano por Brazilio, de ret-entrepreno por ret-anoj, sed de esperantisto por Esperantio kaj la tuta mondo, ĉar finfine ITV celas esti dissendata per kablo aŭ per satelito.

Vere, la projekto eblas : Flavio turneis en nur tri francaj urboj antaŭ ol alveni Parizon, kaj jam ricevis kuraĝigan kvanton da mono. Li esperas, ke forta subteno de la eŭropa parto de Esperantio igos la amerikan kaj azian eniri tiun movadon. Ĉu neatingebla celo ?

*** <http://www.gangalo.com>

NI JA AGADAS



SAULXURES-sur-MOSELLOTTE ————— ☆

“ ...Mia granda okupo de decembro kaj januaro estis trovi korespondantojn por miaj adoleskantoj de 'Maison Familiale Rurale' (privata teknika lernejo, ĉefe instruas pri la profesioj de "servoj al homoj") en Saulxures.

Tio estis longdaŭra traktado kun pluraj fremdaj grupoj, kaj finfine ni interŝanĝas paperajn leterojn kun bulgara grupo (kaj ni, animantinoj, interŝanĝas per la reto)

Mi iom flankelasis la lecionojn de gramatiko, kaj fokusigis la laboron sur komunikado kun samaĝaj fremduloj. En 10 horoj da esperanto por unu jaro, ne eblas multe instrui, sed mi volis, ke ili konstatu, ke la lingvo estas facila kaj uzata, eĉ se ne amase. Ili jam konstatis, ke ili povas kompreni sen vortaro la duonon el la leteroj de la bulgaraj gejunuloj. Mi semas por la futuro... ”

Ginette Martin



METZ ————— ☆



La 15an kaj 16an de novembro, ĉe la Kulturdomo de Metz, 36 rue St-Marcel, la radioamatora grupo F6KF0 kaj la loka Esperanto-Klubo de la urbo partoprenis internacian konkurson de ILERA www.esperanto.org/internacia/ILERA.

Dum tiuj du tagoj, deksep landoj estis kontaktitaj, t. e. ĉirkaŭ kvardek personoj.

Fabrice MONTEIRO, membro de KEM kaj de Radioamatora Grupo, renkontis Renata CHASSARD, prezidantino de esperantistaj radioamatoroj, dum la Universala Kongreso de Fortaleza. Pli malfrue, ankaŭ Philippe MOUROT, animanto de la Grupo renkontis ŝin dum

specifa radioamatora kunveno.

===== agadpropono =====



Kadre de la tutmonda “**La Jardeko por la Edukado al Paco kaj Neperforto**”, evento subtenata de UNESCO, okazos en Parizo, komence de junio, granda “**Salono de la Paco**”...

En tiu Salono, starigi budon eblas. Informcele vi povas viziti ĝian franclingvajn TTT-paĝojn www.decennie.org Jam budo estas rezervita. Kelkaj esperanto-parolantoj de la pariza regiono intencas prizorgi tiun aferon. Tamen via kuraĝiga helpo estas petata, estos bonvena (homa, mona, ktp).

Pliaj informoj : Elisabeth BARBAY (SAT-Amikaro), Emile MAS espergala@wanadoo.fr, René BALLAGUY esperanto.95@wanadoo.fr



A l’instigation de l’UNESCO, dans le cadre de “**La décennie de l’Education à la Paix**”, un nombre important d’associations nationales et internationales organisent début juin à Paris-La Villatte un “**Salon de la Paix**”. L’ESPERANTO se doit d’y participer. Un stand est déjà prévu. De près ou de loin vous pouvez soutenir cette action qui se déroule au seul bénéfice de la Paix. Idées, participation financière, personnes actives sur place sont souhaitées et bienvenues. Des billets d’entrée en prévente -5 €- peuvent être retenus dès maintenant auprès du GAE (Groupe Action ESPERANTO 95), 12 rue du Cdt Cousteau, FR- 95000 BOISEMONT.

Renseignements sur “ **La décennie de la Paix** ”

www.decennie.org

et aussi

Elisabeth BARBAY (SAT-Amikaro), Emile MAS espergala@wanadoo.fr, René BALLAGUY esperanto.95@wanadoo.fr



EUROPA BUNTO

**Manifestacio por lingva
demokratio en Eŭropo**

9 majo 2004



Strasbourg / Straßburg
<http://europa.bunto.free.fr>

...trans ponto ESPERANTO

2004 : Eŭropa Unio iĝos de 15 al 25 landoj, kaj tiel de 11 oficialaj lingvoj al 20. Sed la lingva aspekto de Eŭropo ankoraŭ ne multe estis pritraktata, kaj kun tiom granda nombro da oficialaj lingvoj, kiel konservi justan plurlingvismon : ĉu ne riskas aperi disiĝo inter "etaj lingvoj" kaj "grandaj lingvoj" ? kaj kio okazos por ĉiuj neoficialaj lingvoj nomataj "minoritataj" ? kiel eviti la lingvajn hegemoniojn, kiuj jam aperas pro celo je efikeco ?

Al ĉiuj, kiuj deziras atesti sian intereson por la lingva kaj kultura diverseco de Eŭropo. Al ĉiuj, kiuj deziras defendi siajn minacatajn radikojn. Al ĉiuj, kiuj pro nescipovo de ĉiuj najbaraj lingvoj, proponas la uzon de internacia lingvo neŭtrala Esperanto kiel komunikilo. Al tiuj ni faras ĉi-inviton.

Partoprenu la 9-an de majo 2004 en Strasburgo en la unua manifestacio **EUROPA BUNTO**, kiu estos okazo por fari komunan kaj inter-asocian alvokon favore al

justa respekto de la lingva diverseco en Eŭropo.

Ĉi-sube la lastaj progresoj koncerne la eŭropan manifestacion

- Nuntempe, la TTT-ejo <http://europa.bunto.free.fr> disponeblas en 41 lingvoj !

- La programo de la manifestacio kun **mapo** kaj **horoj** estas nun afiŝita ĉe la paĝo <http://europa.bunto.free.fr/programo.htm> Estas antaŭvidita interalie **koncerto** de la tuluza kantisto *Jean-Marc Leclerc*, fama en la libro "Guinness Records" kiel kantisto en la plej granda nombro da lingvoj

- Pli kaj pli da homoj nin kontaktas ĉiutage por anonci al ni sian partoprenon. Kelkaj el la partoprenontaj asocioj estas afiŝitaj ĉe la paĝo <http://europa.bunto.free.fr/asocioj.htm>. Se vi deziras, ke ni aldonu ligon ankaŭ al la TTT-ejo de via asocio (aŭ organizaĵo), ne hezitu anonci vin plej frue kiel eble al :

europa.bunto@eraro.com

- Ni starigis reton da kunordigantoj en diversaj landoj kaj regionoj de Eŭropo, kies listo videblas ĉe la paĝo <http://europa.bunto.free.fr/kontakto.htm>

- Kunveturadoj jam komencas organiziĝi : ekzemple, autobuso 77-persona foriros el Bretonio por iri al Strasburgo, aliaj regionoj aŭ landoj estas proponontaj similajn incitatojn, kiuj estos anoncigitaj ĉe la paĝo <http://europa.bunto.free.fr/kunveturado.htm>

*Antaŭplezurante renkontiĝi kun vi la 9-an de majo 2004 en Strasburgo, jam post 2 monatoj !
Kore salutas, Sébastien ERHARD, ĝenerala kunordiganto de la manifestacio*

IF

INTERNACIA
FESTIVALO

LA 20-a INTERNACIA FESTIVALO en KIEL en norda Germanio 27.12.2003 - 3.1.2004 Kadra temo: Rusio

Por partopreni la jubilean 20an Internacian Festivalon fine de 2003 ja necesis veturi ĝis tute norda Germanio, al la haven-urbo KIEL ĉe la fordo de la Balta maro. Tamen la vetero estis relative milda sen neĝo kaj frosto en la unuaj tagoj. Sed kio ja estas tiu tradicia Internacia Festivalo, kiu jam atingis la 20an jaron? Ĝi estas simple Internacia Esperanto-ferio-semajno, dum kiu kunvenas gesamideanoj, familioj el diversaj landoj por kune ĝui feriojn, interesajn prelegojn, agrablan kaj amikan etoson. Por kune festi la transiron al la nova jaro en amika internacia Esperanto-rondoj, amuze, gaje kaj solene. La majstro de tiu aranĝo estas la senlaca organizanto Hans-Dieter Platz, kiun oni pli amike nomas HDP (hodopo). Li organizas tute profesie kun multe da entuziasmo tiujn Internaciajn Festivalojn kaj meritas la laŭdojn de la partoprenantoj.

Ĉi-foje aliĝis 200 partoprenantoj el 21 landoj. La ĉefa temo estis Rusio. Jam dum la unua akcepta vespere oni proponis al ni bongustajn rusojn manĝaĵojn. Poste Harald Schicke kaj Hans-Dieter Platz bonvenigis nin por la solena inaŭguro per ŝaŭm-vino kaj anoncis tombolon kun valoraj premioj, la unua premio estis senpaga partopreno al IF.

Pluraj prelegoj temis pri Rusio, ĝia kulturo, skribo, tradicio, kutimoj ktp. El Uzbekio samideano Anatoli Ionesov tre interese prelegis helpe de lumbildoj pri Samarkando kaj ties internacia pac-muzeo ligita al Esperanto. Aliaj prelegoj temis pri Baltio, Dagestano, naturkuracado edukado al demokratio, sciencoludo-instruado, komputilado, ktp. La elektelecoj estis tre vastaj kaj ofte necesis rezigni pri unu aŭ alia interesa prelego por elekti alian.

Oraj kantoj el Rusio entuziasmigis la publikon.



En la vesperoj ni ĝuis la talenton de la rusaj kantistoj. Inter ili Elena Puĥova (Ĉeĥio) Mikaelo Bronŝtejn, Andrej kaj Kirill Obrezkov, Evilina Sokolova, Oraj kantoj el Rusio. Ankaŭ koncertis Ĵomart kaj Nataŝa el Kazahio (nun loĝantaj en Svedio). Post tiuj oficialaj programeroj la IF-trinkejo, la knajpo, restis malfermita ĝis malfrue en la mateno. Ĉi-jare ĝi proponis ankaŭ rusajn trinkaĵojn, bieron kaj limonadon "Baltika" sed ankaŭ koktelojn kun Esperanto-nomo, kiel "ruĝulino", "verdolino", "virgulino" ktp.

Ekestis diversaj rondoj por kune trinki, babilu kaj ankaŭ ludi per plej diversaj societaj



ĉe komputilo

ДОБРО ПОЖАЛОВАТЬ В КИЛЬ!
BONVENON EN KIEL !

ludoj. Ĉe iuj tabloj sonis la gitaroj kaj ariĝis kantemuloj. Alia fenomeno, pli kaj pli da partoprenantoj kunportis siajn teko-komputilojn kaj tiel ĉe iuj tabloj oni interŝanĝis dokumentojn, fotojn, programojn kaj spertojn pri la uzado de komputiloj.

En la posttagmezo estis ankaŭ proponitaj promenadoj al la urbo aŭ al proksima kvartalo. La vetero estis favora por tiaj promenadoj ĉar nur malofte pluvis. La IF-domo estis relative proksime de la ŝip-haveno. Certe ĝi estis malpli impona ol lastjare en Borken (kie ni troviĝis en ĉarma kastelo). Sed la loĝ-ĉambroj estis proksimaj kaj facile alireblaj. En la 3 salonoj de la suba etaĝo okazis la diversaj prelegoj. (Kelkfoje kun ioma reciproka ĝeno). Por iuj programoj kaj ĉefe por la silvestra vespero la 3 salonoj iĝis granda kaj bela salonego, kiu povis akcepti ĉiujn partoprenantojn. La memservejo estis iom malgranda kaj ne-racie organizita. Necesis adaptiĝi kaj iom ĵongli por teni pleton, glason, kaj ĝin plenigi per teo aŭ akvo.

Por la tuttaga ekskurso ni veturis per aŭtobuso al la ĉarma urbo Lübeck. Ĝi estas fama pro la marcipano farita per sukero kaj migdaloj. Ni manĝis en la komforta restoracio de la fama kafejo Niederegger, kaj pli poste vizitis ties muzeon pri marcipano. La kafejo kaj vendejo ĉiam plenplenis. La vetero estis tre favora kaj ebligis fari agrablan viziton en la urbo. D-ro Werner Bormann estis nia tre sperta ĉiĉerono.



En Lübeck

Same, kiel en Borken Danuta Leyk el Pollando proponis ekzerci pri parada danco polonezo. Dudeko da paroj akceptis tion, kaj sukcesis tre impone malfermi la silvestran dancvesperon. Ni parade eniris la grandan salomon kaj ĉe la fino ricevis varmajn aplaŭdojn

de la ceteraj partoprenantoj. La granda kela salono estis tre taŭga por tiu lasta vespero de la



jaro. La manĝoj ja ne estis speciale bongustaj kaj neĝusta-vice prezentitaj. Sed ni tamen ĝuis agrablan silvestran vesperon. Dum tiu vespero oni bondeziris la novan jaron ne nur je noktomezo, sed ankaŭ je la 22a, 23a kaj je la 1a kiam en la landoj de iuj partoprenantoj okazis la jarŝanĝo. Sed kiam ekestis noktomezo, tiam ĉiuj interŝanĝis bondezirojn per tostado de glasoj kaj ĉefe per interkizado. Jen IF refoje ebligis transiri al la nova jaro kaj ĝui dancadon ĝis la 6a matene.

La unuan de januaro oni refoje proponis la novjaran promenon kun iom da neĝo apud la stratoj. Sed la tagoj pasis kaj ja proksimiĝis la lasta tago. Tamen ĉi-jare mi decidis ankaŭ resti por la plilongiga tago la 3an de januaro. Restis ankoraŭ trideko da partoprenantoj, ni vizitis



Grupo de la plilongiga tago

submaran ŝipon kaj monumenton. La lasta vespero okazis en tre amika rondo, kiun agrabligis diversaj kantemuloj kaj muzikistoj. Certe ankaŭ iom helpis ne tute malplenaj boteloj da vino kaj divers-specaj vodkoj.

HDP jam invitis nin por la 21a IF, kiu refoje okazos en Magdeburg. Surloke jam aliĝis pli ol 30 homoj. Ankaŭ vi estos bonvenaj. Vi trovos informojn pri ĝi en La Informilo.

André Grossmann

VOJAĜO DE ROBERTO KUENY AL AFRIKO


Vizito al miaj gelernantoj en Senegalio

Eble scias vi, ke de kvin aŭ ses jaroj mi instruas Esperanton perkoresponde al proksimume trideko da senegalaj ĉefe el Dakaro.

Iam mi ricevis leteron de enloĝanto de Dakaro por "lerni tiun belan lingvon"! Kial ne?

Bonvole, sen subteno de iu asocio de la movado, tute privata decido, mi respondis per sendado de fotokopioj de lecionoj, petante resendon de taskoj, mi korektis kaj resendis k.t.p.

Venis aliaj petoj kaj en 2003 dudeko da gelernantoj sukcesis la lernadon de ĉiuj reguloj. Iam iu invitis min viziti ilin en ilia lando kaj eĉ mi mem ankaŭ deziris ekkoni ilin.



Decidite! Mi forvojaĝis al Dakaro la unuan de novembro 2003. Akceptis min deko da junaj geamikoj eĉ kelkaj iom pli maljunaj jam patroj de granda familio, kiuj sukcese eklernis la lingvon!

